# *OMS asertas ke Usono kaj Brazilo ne serioze atentis la fruajn avertojn pri la nova kronviruso*




?enevo, maj 12 (RHK) Demandite pri la aperoj de la nova kronviruso en Usono kaj Brazilo, la parolistino Margaret Harris, de la Monda Organizo pri Sano (OMS), asertis hodia? ke la avertoj faritaj de la organizo en la komenco de la epidemio ne estis serioze atentitaj de amba? landoj.

Usono estas la lando, kiu registras pli da kazojn de Covid-19 tutmonde kun pli ol 1,3 milionoj da infektitoj kaj pli ol 80 000 mortintoj. Brazilo estas unu el la landoj pli dama?itaj de la pandemio en Latinameriko.

La parolistino anka? diris  dum informa sesio virtuala, ke la kronvirusos estas “tre komplikaj virusoj” kaj malfacilas produkti vakcinojn kontra? ili, kvankam ekzistas promesplenaj traktadoj. “Ni havas kelkajn traktadojn, kiuj ?ajnas esti la? fruaj studoj limigante la severecon de la malsano”, esprimis la funkciulino rimarkante ke en la momento ne ekzistas “io ajn kapabla mortigi a? haltigi la viruson” entute.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/222458-oms-asertas-ke-usono-kaj-brazilo-ne-serioze-atentis-la-fruajn-avertojn-pri-la-nova-kronviruso

**Radio Habana Cuba**